

& Inter du malbonoj:

< Rekante 11 el 23 batoj por strofo, entute 161 paŝoj dum 2 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigis Martin Strid (2015) per sama melodio kiel por "La enamiĝinta leono" kaj nova rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:23> (

a;Mi /LaLa TiTi dore mido Ti Ti;Mi rere TiTi dodo LaSi Ti Ti;

(#Rekantaĵe: La Ti dore mido Ti; rere TiTi dodo LaSi La)

)×7)+

(&Strofoj:

'1 Bu/ĉisto kaj paŝtisto voje pasis. ; Jen, ili ŝafon, kiu bele grasis,

(×:; **Ŝaf**o volis vivi plu ; **Ĝi** elektis inter ili du.)

'2 ekvidis vagi sur la kamp' senmastre, ; alkuris, kaj tuj ekkverelis draste,

'3 al kiu apartenu la trovito. ; Post longa disputado kaj ekscito,

'4 ĉar tiutempe ĉiu best' parolis ; ankoraŭ homalingve, ili volis,

'5 ke mem la ŝaf' decidu pri ĉi tio. ; Tiu demandis ilin pri l' metio,

'6 kaj, kiam la respondojn ĝi akiris, ; al la paŝtisto ĝi ekĝeme diris:

'7 "Nu, mi stariĝas do sur vian flankon, ; prefere doni lanon ol la sangon."